

Fono:

Kiam oni fotas diĝite, ekemple langon, pluraj detaloj ŝanĝiĝas dum transiro de la reala mondo al la diĝita.

La bilformato kiu normale uziĝas (JPEG) kaj la uzita datumdensigo ŝanĝas la kolorojn, kaj ne eblas ekzakte retrafi la originan koloron. Tial malsamaj programoj montros la saman bildon en malsamaj nuancoj.

La softvaroj de la fotiloj ankaŭ malsamas, kaj interpretas kolorbalancojn malsame. Krome, la uzo aŭ ne de fulme sufiĉe gravas ĉe tia mallonga distanco.

La ekranoj, sur kiuj vidatas la bildo, malsamas, kaj ĝustigoj varias de uzanto al uzanto. Kaj se oni kuraĝus printi la bildon surpapere, oni aldonas eĉ plian vaiablon al la listo de erarfaktoroj.

Oni do bezonas metodon kiu spite al la teknologio povas retrovi la realecon en kiu oni kreis la foton.


La solvo estas evidenta: Neŝanĝebla normo, kiu rilatigas sin al la fotita objekto, kaj fotiĝas sambilde.


Tiel, preskaŭ sendepende de la teknologio-interferenco, eblas uzi la normskalon kune kun la objekto por reteni kiel aspektis la objekto dum fotado.

La DorisKarto estas tia neŝanĝiĝanta normaĵo, kaj tial solvo por la problemo. Kun ĝiaj naŭ bazaj langdiagnozaj koloroj oni nun povas reteni kolornormon en langofoto, kaj oni ĉiam povas reidentigi la originajn kolorojn de la lango.

La DorisKarto

Retrovu la originajn langokolorojn



Priskribo kaj uzo 2010-09-24 

www.DorisPlate.com

La DorisKarto portas normigitan kolorskalon, adaptitan al langodiagnozo.

La koloroj frontflanke portas anglan mallongigon, dum dorsflanke legeblas la plena nomo.

La nomoj de la koloroj en Esperanto estas:

Mallongigo	Koloronomo
NO	Normala
LR	Helruĝa
RE	Ruĝa
DR	Malhelruĝa
PA	Pala
RP	Purpura, ruĝeca
BP	Purpura, blueca
OR	Oranĝa
BR	Nigra/ruĝa

Fotado de la lango:

Dum fotado gravas, ke oni metas la DorisKarton tiel, ke almenaŭ parto de ĉiuj kolorstrioj videblas sur la foto.

Gravas por kaj la supra kaj suba surfacoj, ke oni etendu la langon nature kaj malstreĉe.

Oni povu vidi la supron de la tuta lango de pinto ĝis radiko. Se tio ne eblas per unu foto, oni devas partfoti la langon plurfoje.

La proceduro ne daŭru pli ol 10-15 sekundojn. Se oni etendas la langon tro - kaj dum tro da tempo - oni riskas, ke la langomusklo trostreĉiĝas kaj ke la lango fariĝas pli ruĝa aŭ pli malhela.

Oni alkoholpurigu la karton antaŭ kaj post uzo.

